nia voĉo

madrida esperanto-liceo februaro 2024

## ĜENERALA KUNVENO DE MADRIDA ESPERANTO-LICEO

La laŭstatuta ĝenerala kunveno de Madrida Esperanto-Liceo (MEL) okazos la 19an de februaro, je la 18,30, en la sidejo de la asocio.

La anoj ricevos la oficialan kunvokon en sia poŝto, kune kun la tagordo kaj la necesaj dokumentoj.

Se vi ankoraŭ ne pagis la ĉijaran kotizon, memoru ke eblas tion fari tiun tagon en la sidejo mem, aŭ vi povas pagi pere de la banka konto de MEL: banko ARQUIA BANCA, numero: ES55 3183 2800 1310 0655 7423.

Se vi ankoraŭ ne estas ano, memoru ke la kotizo estas nur 12€ jare. Plenigu la formularon troveblan en fako "Dokumentoj" de la retejo https://www.esperanto.es/mel/, aŭ simple kontaktu kun Liceo en la kutima adreso: madrid@esperanto.es.

## PLIA POEZIO POR PALESTINO, ANKAŬ EN ESPERANTO

En la pasinta numero ni informis pri prezentado favore al la palestina popolo per poezio, ankaŭ en Esperanto. En januaro okazis pliaj aktivaĵoj, eĉ du en sinsekvaj semajnfinoj, en kiuj rolis niaj Esperanto-poetoj Miguel Fernández kaj Jorge Camacho.

Kelkaj kolektivoj de madridaj poetoj organizis du aranĝojn. La unua el ili, Poetoj por Gazao, havis lokon la sabaton, 13an de januaro, ĉe Espacio Ronda (Ronda de Segovia), vespere. Dudek bardoj, inter ili du esperantistoj, Jorge Camacho kaj Miguel Fernández, estis invititaj voĉlegi siajn poemojn "kontraŭ la krimoj de la Israela ŝtato kaj por la palestina popolo", konekse kun solidara babilrondo "Poezio por Palestino – Versoj kontraŭ la genocido", kun Nayed Abufayyad, prezidanto de la Hispana-Palestina Komunumo Jeruzalemo en Madrido kaj Yamil Abusada, vicprezidanto de la Hispana-Palestina Kuracista Asocio.

La dua aranĝo, Poezio por Palestino, poezia maratono surbaze de 12 sinsekvaj horoj, de la 10a matene ĝis la 10a nokte, seninterrompe, samcela kiel la unua, okazis unu semajnon poste, nome la 20an de januaro. Tia iniciato, fare de la grupo de socikritikaj poetoj praktikantaj la t.n. "poezion pri la kritika konscienco", eĥiĝis tiel, ke en 30 urboj, pluraj hispanaj kaj kelkaj hispanamerikaj, oni organizis similajn poeziajn maratonojn. En ĝi, estis invititaj al partopreno 120 poetoj, inter ili denove Miguel Fernández (en la apuda foto) matene, kaj Jorge Camacho posttagmeze. Tiu poezia maratono havis lokon ĉe CSOA (*Centro Social Okupado y Autogestionado*) La Ferroviaria.



Meze de ambaŭ deklamadoj kelkaj esperantistoj kuniĝis por partopreni manifestacion, kiu tagmeze startis de loko sufiĉe proksima al la agado, kiel ero de la plej granda protesta kunagado apoge al Palestino realigita en 91 hispanaj urboj, por peti la Hispanan Registaron, ke ĝi aliĝu al la genocido-denunco far Sud-Afriko kaj, krome rompu siajn rilatojn kun la Israela ŝtato.

## LA SCIENCA KALENDARO 2024 EN LA RETO

Jam troviĝas en la reto la Scienca Kalendaro 2024 de la hispana Supera Konsilio por Scienca Esplorado (CSIC), kies datrevenoj estas ankoraŭfoje tradukitaj al Esperanto. Bedaŭrinde ĉijare ne eblis eldoni pdf-version en la internacia lingvo, sed ĉiukaze en la adreso https://digital.csic.es/handle/10261/341368 oni trovas la tekstojn de ĉiu tago, kaj ankaŭ

kalendaron en la formato *ical*, kiun vi povas aldoni al via persona kalendaro. Memoru ke la kalendaro havas ankaŭ tŭiteran konton, kiu ĉiutage informas pri la koncerna datreveno, en la adreso: https://twitter.com/scikalendaro.

## ARANĜOJ POR GEJUNULOJ

En februaro okazos en Katalunio renkontiĝo organizata de ties junulara asocio KEJ, kun la nomo RenKEJtiĝo, de la 23a ĝis la 25a de februaro 2024 en L'Espluga de Francolí. Ĝi entenos tre riĉan kaj amuzan programon. Vi povas vidi la detalojn en la retejo: https://www.esperanto.cat/junularo/la-renkejtigo/.




La internacia asocio de junuloj, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), estas nuntempe tre aktiva, kaj organizas multajn agadojn kiujn madridaj junuloj povas partopreni.

Ekzemple, TEJO organizas la seminarion "Kreante pontojn per Interkomprenigo" kaj serĉas 20 junulojn kiuj pretas diskuti kaj lerni pri temoj rilate al multikultureco kaj migrado inter junuloj en Italio. Legu la detalojn kaj kandidatiĝu ĝis la 4a de februaro, ĉe: https://www.tejo.org/partoprenanto-seminario-ijf2024/.

Kaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, TEJO invitas al "Junuloj kaj Lingvoj", la 24an kaj 25an de februaro. Oni povas proponi programeron, ekz. prezenti ion en via gepatra lingvo, instrui lingvon al la tuta mondo. La agado estas reta, per Discord.

Krome, TEJO prezentis kunvokon por helpi al homoj partopreni en la venonta Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos en Šventoji (Litovio), inter la 18a kaj la 25a de aŭgusto 2024. Vi povas kandidatiĝu por la konkurso "Partoprenu IJK-n". Legu la detalojn ĉe ĝia retejo https://www.tejo.org/konkurso2024/.

## RENKONTOJ EN MADRIDO

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sen aparta programo.

En januaro komenciĝis kurso de Esperanto en la sidejo, kiu plu daŭros la sabatojn, inter la 11a kaj 13a horo.

La unuasabata kunveno okazos la 3an de februaro, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma kaj sendependa de via lingvonivelo.

Denove vizitos Madridon Viviana, el Italio. Ŝi venos la vendredon 9an kaj foriros la lundon 12an. Ŝi gastos en la Fuenlabrada klubejo. Oni provos aranĝi renkontiĝeton, do bv. atenti la konatajn informkanalojn.

## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo X (antaŭe *Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com